

Esperanto Societo Frankfurto

# Esperanto-Informilo

**Januaro 2025**

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Aforismoj
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo



Foto decembro 28/12/2024, sendita de G. Hennemann: „La Vilhelmŝtonoj proksime vilaĝo Wallenfels, komunumo Siegbach, estas mistika loko kie la tempo ŝajne haltiĝas“ https://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelmsteine

Mesaĝo de la prezidanto:

La atenco de Magdeburg rememorigas ke en malfermaj socioj absoluta sekureco neeblas. Ekzistas pli kaj pli da retenita kolero pro suferoj kaj atendo al pli bonaj vivkondiĉoj – kondiĉojn, kiujn nur atingis malmulto da privilegiitoj. Tiu malmulto aldone profitas de la laboro de granda amaso da malbone pagitaj homoj, malkuplitaj de la ekomomia kresko. La hinddevena aŭtoro Pankaj Miŝra priskribas tiun situacion en sia laŭdata kaj ege rekomendinda libro “La erao de Kolerego – Historio de la nuntempo”, kiun mi ĵus legis kaj mallonge surparolas en la eseo “Perforto kiel ago de memdefendo”.

Amuzan legadon,
G. Hennemann, 1-an de januaro 2025

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender:
Georg Hennemann
c/o Rehgartenstr.16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

**Bankverbindung / bankkonto:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

**Jahresbeitrag / jarkotizo:**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**Unua mardo**
La 7-an de januaro 2025
ekde la 19-a horo:  Sentema babilado per Zomo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

**Dua mardo**
La 14-an de januaro 2025
ekde la 19-a horo:  Interna babilado per Zomo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

**Tria mardo**

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 21. Januar, 2025

Mardon, la 21-an de januaro, 2025

18:30 h  Lingva Rondo

19:30 h   Prelego: Dr. Wolfgang Schwanzer

„Personaj impresoj de la 109a UK en Aruŝo (Tanzanio)“
----
„Persönliche Eindrücke vom 109. Weltkongress in Arusha (Tansania)“

**Mardo, la 28-an de januaro, 7pm**
La 28-an de januaro, 2025
ekde la 19-a horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

---

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,
https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

# El la klubo

**Anoncoj:**

- 01.01.25 00:00 Ĉion bonan por la novjaro por ĉiuj klubmembroj kaj familiaro.
  Ni bonvenigas nian novan membron Ernst Bünemann el Frankfurto.

- 25.01.25 15:00 Prelego de Heidi Goes pri la „Orienta Timoro, historio de Esperanto-movado en Indonezio, Malajzio kaj Singapuro” kaj koncerto de Abel Massiala en la junulargastejo Franfurto, salono E11

- 15.04.25 19:00 Membrokunveno en Saalbau MÜZ



# Perforto kiel ago de memdefendo – Surparolado pri la libro "La erao de Kolerego" de Pankaj Mishra

Eseo de G. Hennemann

La Vilhelmŝtonoj apud vilaĝo Wallenfels estis nomitaj laŭ Vilhelmo la 1-a de Nassau (1792-1839), kiu en 1816 ekregis kaj en la princlando de Nassau-Weilburg kaj en la duklando de Nassau-Usingen en rapida sinsekvo. Tio donis al la duklando de Nassau la formon en kiu ĝi ekzistis ĝis 1866. Duko Wilhelm vizitis la grupon de rokoj en 1830 kaj havis ĉasdomon konstruitan proksime, kiu ne plu ekzistas hodiaŭ. Post lia frua morto en 1839, la rokoj, antaŭe nomitaj fagoŝtonoj (germane: Buchsteine), ricevis sian nunan nomon. Vilhelmo la 1-a de Nassaŭ kaj lia filo Adolfo de Nassaŭ estis tipaj reprezentantoj de aristokrataj regantoj, kiuj heredis sian riĉecon kaj profitis de la laboro de siaj subuloj, sed ne volis doni pliajn rajtojn al la civitanoj. Tia despota konduto kondukis al la t.n. martaj revolucioj ekde la jaro 1848. Tuja antaŭsigno de la martaj revolucioj en mezeŭropo estis la krizjaro de 1847, kiu estis antaŭita per severa rikoltfiasko en 1846. Tio rezultigis malsatkatastrofojn en preskaŭ ĉiuj germanaj ŝtatoj kaj regionoj kaj samtempe al diversaj malsatribeloj kiel rezulto de la plialtiĝo de manĝaĵoprezoj. Multaj pli malriĉaj partoj de la loĝantaro trafitaj de malriĉeco, kiel laboristoj, malriĉaj metiistoj, agrikulturaj laboristoj, ktp., pro siaj sociaj malfacilaĵoj ĉiam pli aliĝis al la postuloj de demokratiaj kaj liberalaj rondoj. Krome, estis tia plimultiĝo de la loĝantaro, ke la agrikultura ekonomio en la kamparo, kiu fariĝis pli produktiva, kaj la industrio en la urboj, ne povis plu absorbi la estiĝintan amason da laborforto. La rezulto estis amasa senlaboreco. La plusa laborforto formis "industrian rezervan armeon." Nova loĝantara klaso, la proletaro, rapide kreskis. La labor- kaj vivkondiĉoj en industriaj firmaoj kaj iliaj ĉirkaŭaj regionoj estis ĝenerale malbonegaj en la 19-a jarcento. La plej multaj laboristoj vivis en la getoj kaj cirkaŭajo de la fabrikoj rande de la vivnivelo aŭ ofte sub ĝi, minacataj de senlaboreco kaj sen socia sekureco.

En sia libro "La erao de kolero" la aŭtoro Pankaj Miŝra tre detale analizas tiun tiaman situacion kaj klarigas, ke la hodiaŭa situacio en tutmonda skalo fakte similas: Ne ekzistas batalo de la racia, klerigita okcidento kontraŭ malantaŭen restanta oriento. Kaj ankaŭ ne ekzistas la t.n. kolizio de civilizacioj aŭ kulturoj (angle: clash of civilisations and cultures). Laŭ Miŝra la angloamerika kulturo jam disvastiĝis kaj penetris ĝis la lasta indiĝena grupo kaj ne plu haltigeblas. Kelkaj teoriuloj kaj verkistoj eĉ argumentis ke homaj rajtoj, liberala demokratio, kaj la kapitalisma libermerkata ekonomio fariĝis la nura restanta ideologia alternativo por nacioj en la post-malvarma milito mondo. Specife, Francis Fukuyama argumentis ke la mondo atingis la "finon de historio" en hegela signifo. La evidenta problemo kiu rezultas el tio t.n. "fino de la historio" estas, ke la homoj pli kaj pli egoismas kaj koleras, stato kiun jam J*ean-Jacques Rousseau antaŭvidis* en sia verko "*Pri la socia kontrakto*" el la jaro 1762. Rousseau, kiu protestis kontraŭ ekstrema malegala riĉeco, ankaŭ argumentis ke egaleco estas esenca por la akiro de libereco, kaj finis ke leĝaro devus krei egalecon. P. Miŝra skribas pri Rousseau: "Li estis la prototipo de homo, kiu, malgraŭ sia evidenta sukceso, sentas, ke li estas ĉe la fundo de la piramido kaj kiu scias, ke li neniam konvenos al la ekzistanta ordo ... En sia soleco, li kredis, kiel multaj konvertitoj kredis je ideologio aŭ religio, ne estante koruptebla. Tiu ĉi kredo je sia propra nekoruptebleco donis al lia *liberigo de sociaj konvencioj* heroan aŭron kaj transformis lian senpovecon en senton de ĉiopovo. En lia vojaĝo de viktimeco ĝis morala supereco, Rousseau kreis dialektikon de rankoro kiu fariĝis ordinara en nia tempo." – Bedaŭrinde la aŭtoro P. Miŝra ne montras eliron el tio maljusta evoluo, malgraŭ solvoj ja ekzistas: Asocioj kiel justa ekonomio (angle: Fairconomy) montras vojojn por atingi „merkatan ekonomion sen kapitalismo". Kaj miaopinie la natura monumento „Vilhelmŝtonoj" devus esti alinomita reen al fagoŝtonoj, ĉar ili ne estas posedaĵo de iu arbitra despoto nomita Vilhelm, sed nia ĉiama komuna bono.


https://de.wikipedia.org/wiki/Neun_Forderungen_der_Nassauer
https://de.wikipedia.org/wiki/Deutsche_Revolution_1848/1849
https://www.deutschlandfunkkultur.de/pankaj-mishra-ueber-das-erbe-des-imperialismus-jeder-100.html
https://www.deutschlandfunk.de/pankaj-mishra-freundliche-fanatiker-mythos-vom-liberalen-100.html
https://www.deutschlandfunk.de/pankaj-mishra-das-zeitalter-des-zorns-ein-unbehagen-an-der-100.html
https://www.deutschlandfunkkultur.de/pankaj-mishra-das-zeitalter-des-zorns-ein-moralischer-appell-100.html
https://www.deutschlandfunk.de/pankaj-mishra-begegnungen-mit-china-und-seinen-nachbarn-100.html
https://eo.wikipedia.org/wiki/Pri_la_socia_kontrakto
https://inwo.de/einstieg/fairconomy-was-ist-das.html
https://www.kontextwochenzeitung.de/gesellschaft/701/grosser-stresstest-fuer-die-gesellschaft-9715.html
https://inwo.de/mitmachen/verbindungen-links.html

# Diversaĵoj

**Ŝerco** (sendita de Gundhild):

Gepatroj kunvenigas kvinjaran filon en adventan koncerton. La koncerto plaĉegas al li.
Je la vojo hejmen li diras al siaj gepatroj:
- Por kristnasko mi volas trumpeton.

La patrino terurite eksklamas:
- Ne, mi ne volas aŭdi la bruon dum la tuta tago.

La filo trankviligas ŝin:
- Mi nur ludos, kiam vi dormos.

**Proverbo de la monato** (elektita de G. Hennemann)

La proverbo kiun mi hodiaŭ prezentas temas pri kolera agado. Vi devas demandi vin mem ĉu la proverbo montriĝas ĝusta antaŭ la fono de teroista atako kiel ĝi nun okazis dum la kristnaskfoiro en Magdeburgo.

[zam-239.02] Sen povo kolero estas ridinda afero

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002280.htm
https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/temo_kolero.htm

# La Tri Saĝuloj Alvenas

(Elangligis kaj ŝanĝetis Felmano Ulriko.)

**La Tri Saĝuloj Alvenas**

*de Stephen Ruddy*

Brila stelo pendas super stalo en Betleĥemo, kiel giganta pinglo de Guglo-Mapoj. Tri saĝuloj alvenas.

“Ni alportis oron, olibanon, kaj mirhon, donacojn konvenajn al la Reĝo de la Judoj,” deklaras Melĥior, kliniĝante antaŭ la Sankta Familio.

"Efektive..." ekdiras Baltazar...

“Ho, ne,” respondas Gasparo, "ĉu vi forgesis la mirhon?"

"Mi ne forgesis ĝin," respondas Baltazar. "Ĵus iris en alian direkton."

"Ni interkonsentis pri oro, olibano kaj mirho. Ni estas la Tri Saĝuloj—ĉi tiuj donacoj reflektas la tri rolojn de la estonta Juda Reĝo, kiel jura regestro, religia gvidanto, kaj sanrilata kuracisto."

"Nu, nu, Melĥior, ni devus havi fidon en Baltazar,” proponas Gasparo. "Li ja estas saĝa homo. Certe, li elektis donacon de granda digno kaj respekto."

“Dankon, Gasparo,” diras Baltazar, donante al Mariino grandan skatolon. "Ĝojan Kristnaskon, Feliĉan Naskiĝtagon, kion ajn."

“Hmm,” diras Mariino, skuante la grandegan pakaĵon.

"Kio estas skribita sur la skatolo?" demandas Jozefo.

"Ĝi diras, >>Ni kreis la Shaq-a-Roni-picon por nutri grandajn apetitojn kaj efiki diferencon. Kun ok faldeblaj tranĉaĵoj de la grandeco de Shaq, ŝarĝitaj per kroma fromaĝo kaj kovritaj per pli ol sesdek peperonoj de rando ĝis rando, pico pligrandiĝas kiam vi Shaq-a-Roni.<<"

"Ho, saĝuloj, kion povas signifi ĉi tiu enigmo?" demandas Jozefo. "Ĉu Ŝaq rilatas al Meŝaĥ el la Libro de Daniel?"

"Ĉu ne pictranĉaĵoj ĉiam estas 'faldeblaj'?" demandas Mariino.

"Kiel oni faras tiun Shaq-a-Roni?" demandas la tamburisto-knabo, kies donaco subite ŝajnas senbrila apud la oro kaj la pico.

"Simple malfermu la skatolon," respondas Baltazar.

Mariino paŭzas por pritrakti la belan vizaĝon de Shaq sur la kovrilo, poste malfermas la skatolon. Lumo brilas sur la enorma pico, kaj la anĝeloj ludas glisandoj sur siaj harpoj.

"Tio estas la plej granda pico, kiun mi iam ajn vidis!" krias Jozefo.

"La brilaj ruĝaj diskoj havas pli da oleo ol la tuta Arabujo!" ekkrias unu de la paŝtistoj.

"La fromaĝo havas la teksturon kaj guston de rezino!" deklaras unu de la anĝeloj.

"Atendu, ĉu ĉi tio estas koŝera?" demandas Mariino, kiu malamis devi ĉiam esti la respondeculo.

La infaneta Mesio svingas la manon kvazaŭ por diri "nur ĉi foje, escepte, estas bone manĝi ĉi tiun nebenitan porkaĵon kaj fromaĝan abomenaĵon".

Mariino, kiu ĵus naskis bebon kaj kiun neniu pensis nutri dum la lastaj dekdu horoj, prenas tri picajn tranĉaĵojn.

"Ĉi tio estas la plej bona pico, kiun mi iam havis!" la Dipatrino diras. Fakte, ŝi neniam antaŭe manĝis picon. Tamen, trafis la punkton. "Ni certe rezervos lokon en la ĉielo por vi, Baltazar!"

“Ha ha!” diras Baltazar, pikante Melĥioron en la bruston, kaj lude tirante Gasparon je la barbo.

"Mi elspezis 35.000 talerojn por mia donaco," diras Melĥior, rigardante la oron kaj subite ne plu sentante sin tiom saĝa.

La Tri Saĝuloj nun sinretenas, kaj kiam ili atingas la pordon de la stalo, Baltazar metas la manon profunde en sian poŝon kaj vokas "Ho, mi ricevis ankaŭ ĉi tion por vi", reiras, kaj metas sakon da mirho en la staltrogon. Balthazar faras klakan sonon per sia buŝo kaj formas fingropafilon al Melĥior kaj Gasparo dum ili direktiĝas al siaj kameloj.

"Ne, ne, ne," diras Mariino, prenante la sakon de la infano Jesuo kaj flankenmetante ĝin por gardi. "Ni ne manĝas mirhon, karulo."

"Estas pli bonaj ingrediencoj," diras la paŝtistoj.

"Pli bone picon," proklamas la anĝeloj.

--

## Enigmo

La sesa de januaro estas ja kristana festotago rilate al vizitintoj je la naskiĝejo de Jesuo. Greklingve oni nomis tiun tagon "Epiphanias", vorto uzata ankaŭ en kelkaj germanujaj federacieroj por nomi tiun tagon en la kalendaro. En multaj lingvoj, oni ĝin kutime nomas "Sanktaj Tri Reĝoj". En la federaciero Baden-Virtembergo, kie ĝi estas laborlibera tago, ĝi oficiale nomiĝas tiel, estas skribite en la kalendaroj germanlingve "Heilige drei Könige".

Nun al la demando de tiu enigmo:
Kiu(j) el la tri vortoj el la nomo "Sanktaj Tri Reĝoj" estas ĝustaj, kaj kiu(j) estis poste inventitaj, sed ne havas faktan bazon en la Biblio?



# Lasta Paĝo




"La 109a Universala Kongreso de Esperanto okazis 3.-10. aŭgusto 2024 en la tanzania urbo Aruŝo. Ĝi estis la unua UK en Afriko kaj aliĝis pli ol 850 homoj el 65 landoj. La plej multaj venis el Tanzanio kaj el la najbaraj landoj Burundo kaj DR Kongo, pro tio la kongreso havis vere afrikan karakteron. Kadre de kongresa temo "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo" okazis multaj fakaj prelegoj kaj diskutrondoj, sed ankaŭ riĉa kultura programo. Kompreneble ankaŭ safarioj al naciaj parkoj kaj vizitoj de tradicaj Masai-vilaĝoj estis allogaj programeroj. Nia membro Wolfgang Schwanzer kaj la edzino Iris Leppert ĝuis la kongreson. Ili raportos dum la klubvespero en januaro pri personaj impresoj de tiu ĉi unika evento."